

センター通信

第260号

2009年11月03日発行

名古屋エスペラントセンター Nagoja Esperanto-Centro
461-0004名古屋市東区葵一丁目26-10ユニブル新栄301号
郵便振替 00840-8-40765 [名古屋エスペラントセンター]
<http://homepage2.nifty.com/nagoja-esperanto/>



東海大会の参加者たち 9月12日名古屋市女性会館で

撮影：山田義

目 次		Unikle pilgrimi en Bjalistoko-----
東海大会 -----	2	----- IKAI Yosikazu 6
タクシーで----- 磯部晃	3	Bjalistoko, urbo de UK----- MAEDA Kaiti 9
コラさんのメール-----	5	編集後記 ----- 12
ザメンホフ祭の第一報-----	5	

名古屋のエスペ란ティストの交流会としての東海エスぺラント大会

今年は準備不足などで開催が例年の5月から9月にずれた。

第58回東海エスぺラント大会は9月12日（土）名古屋女性会館で行われた。4人の講演と協議会と夕食会があった。

犬山エスぺラント会の後藤好美さん司会で、西尾晴孝さんが開会のあいさつ。最初に前田可一さんが、ポーランドのビャウイストクで今年開かれた第94回世界エスぺラント大会に参加したことをエスぺラントで講演。ザメンホフ生誕150年記念の大会の様子や、大会後の旅行でフィンランドのヘルシンキやトゥルクでお世話になったエスペ란ティストについて報告した。いっしょに旅をした山田義さんなどが撮影した写真約300枚をプロジェクターで見ながら話した。

次に、愛知県大府市の公立中学で学外講師としてエスぺラントの授業を担当している磯部晃さんの講演があった【写真】。中学生にエスぺラントを教えるために工夫をこらした興味ある授業の方法を実際に使っている教材を披露しながら話した。

寸劇もあった。この日のために練習した Ĉambro Ĉarma の8人が寸劇 “Rakonto pri la spegulo” （25分）を演じた。盲導犬を連れた中村進さんが物語の進行役を努め、生のエスぺラントは初めてという参加者にも印象を残した。

竹崎睦子さんは、最近パスポートの書き換えのときにエスぺラント式表記が成功したことを日本語を交えながら話した。

西尾晴孝さんは今年2月ネパールで行われた Himalaja Renkontiĝo の体験記を講演した。参加者たちと村人との交流などプリント写真を見せながらの熱弁だった。

今後の東海地方の運動については、後藤好美さんの司会で協議が進められた。来年の開催地など話し合ったが結論は出ていない。

参加者は20名だった。夕食会は同じ部屋で、取り寄せ弁当による夕食会だった。使い捨てトレイなどを使った取り寄せ弁当に不満がありそのため夕食会に加わらなかった人もいた。13人。食べながら海外旅行や最近の読書や生活の様子などをエスぺラントで報告し合った。

名古屋エスぺラントセンターが持っている整理中の図書の中から重複した古本を今回のためにNEC委員の前田可一さんが段ボール4箱を並べた。値段は自由に箱に入れてもらい、ほしい本を引取ってもらった。半分ほどが片付いた。14,200円だった。

土曜日の午後と夕食会までの交流会になった。司会も講演もほとんどエスぺラントで進行した。従来の、講師を招いて大会をするという形ではなく、参加者が日頃の学習や運動の発表、報告をするという形式が中心になった。交通の便利な名古屋市内で開いたことで見学とかエスぺラントに興味を持ち始めた人の参加もあった。12日の朝日新聞に名古屋版に「エスぺラントの日を守れ」【コピー】という記事が載り、これを読んで様子をのぞいていった人もいた。

この会の会計にあたった犬山エスぺラント会の宮下桂子さんから会計報告があり次ページに掲載する。



参加者たち



▼朝日新聞9月12日の名古屋版

第58回東海エスペラント大会会計報告

収 入		支 出	
会費	17人 15000円	会場費	5200円
弁当代	13000円	弁当代	16000円
		菓子代	1100円
		プロジェクター	1000円
		はがき 40枚×50	2000円
		印刷代 40枚×10	400円
		カラープログラム 25枚	500円
		残金	1800円
合計	28000円	合計	28000円

今回は急ごしらえの上に、エス歴の短い犬山エスペラント会主催でしたが、山田さんご夫妻の援助もあり無事開催できました。半日余の短い日程でしたが、内容は良かったと思います。

犬山エス会のMさんは多忙でしばらくお会いしていませんでしたが、時間が取れるようになり大会にも参加し、今後の勉強会にも参加できるということで嬉しく思いました。

また、大会とは直接関係ありませんが、扶桑在住の若い女性2人が勉強したいということで、早速第一回目の勉強会を開きました。ずっと続けてもらえたらと思います。若い仲間が増えるということは、こちらも気持ち若くなり、また、今後が心強いと感じました。

後藤好美



タクシーで

磯部晃

当日（9月12日 土）の会場（名古屋女性会館）前は、時々車で近くを通っていて知っていたが、JR中央線の鶴舞（つるまい）駅に降り立ったのは何十年振りだろう。小雨も降っているしカバンも重いので、駅前のタクシーを利用することにした。

mi(aki): 「すぐの場所でタクシー利用。すみませんね！運転手さん。」

soforo: 「いええ。」

mi: 「今日、ここ（タクシーの行き先）でエスペラントの大会がありますんでね．．．」

so: 「エスペラントって。エスペラント語のことですか？」

mi: 「ええ！そこでエスペラント語で少し喋ることになっているですヨ。」

so: 「へえ。エスペラント語ってまだあるんですか？ 私も25年前にやったことがあるんですヨ！

すっかり忘れていたな。」

mi: 「おどろいたナ、運転手さん。まだまだ健在ですヨ、ESPERANTOは。知って使える人の数こそ増えているとはいいいくいますが、ここ数年でインターネットでの利用は急増ですネ。インターネットでラジオ放送も毎日聞けますよ。」

so: 「そうか。エスペラント語、すっかり忘れちゃったな」

mi: 「運転手さん。袖触れ合うも何かの縁！今日から再度勉強開始、お願いします（笑い）。今年は山梨／甲府でエスペラント語の日本大会もあるんですよ。また思い出しつつボチボチ始めてくださいナ」（暫しエスペラント界の現状について話が弾んだ。）

と、云う会話のうちに会館の前に到着。その瞬間にタクシーのメーターもカシャッと上がりました。

さすがプロ、商売にはぬかりはありません。

6月12日朝日新聞にNEC会員杉原直さんの記事が載った。

「名古屋の元教諭、現地ボランティアで考案。ブータン体操ごいっしょに」という見出しだ。杉原さんが体操の実演をしている写真入りである。

杉原さんは退職後中国重慶で日本語を教えるボランティアに行っており現地のエスペランティストと交流があったと聞いている。ブータンにも国際協力機構から派遣されこの体操を考案したのだそう。

8月20日三ツ石清さん【写真】の仏式葬儀【写真右】が娘さん喪主で営まれた。三ツ石さんは中川区に住んでいた。97歳 最近では、2005年のザメンホフ祭に車イスで参加されたことがあった。



この夏、コラさんからメールが入りました。

Estimataj! Kiam ĵus antaŭe mi vidis fotoĵojn en la interretaj novaĵoj de la Nagoja Esperanto-Centro, mi vidis ankaŭ bone konatajn vizaĝojn kaj ekpensis, ke estinte ankaŭ ano de la Centro ĝis ĉirkaŭ ses jaroj antaŭe mi foje povus sendi vivsignon al vi malnovaj herooj. Disde Nagojo mi transloĝiĝis al Vieno en Aŭstrio, kie mi vivas kontemplan vivon, okupitan pri diversaj aferoj, sed ĉefe pri teatro, kiel ja ankaŭ en Nagojo mi estis okupiĝinta pri noaj farsoj [狂言] kaj ne nur pri instruo de la Germana en la Universitato Nagojo, ŝtata ankoraŭ tiam. Antaŭe mi vojaĝis multe, sed nun preskaŭ ne kaj tute ne tiom malproksimen kiel Japanion, diference al miaj du junecaj Japanaj filinoj, el kiuj la unu ĵus nun estas en Japanio kelkon da semajnoj por okupiĝi pri la tiea modo kaj la alia ĵus revenis de Japanio al Eŭropo. Tamen mi intencas veturi al Esperantistoj en la urbo Triesto en Italio, kiu urbo estas la plej proksima havenurbo al Vieno, kaj estas membro de la Bratislava Esperanto-Societo, sed Bratislavo, la ĉefurbo de Slovakio, kaj Vieno estas tiom proksimaj, ke ambaŭ estas nomataj ĝemelurboj. Mi ĝojas ke vi persistas la Nagojan Esperanto-Centron per tiom da fervoro kaj gratulas vin pro tio.



Sincere Folkmaro KOLERO



名古屋のザメンホフ祭（ザメンホフ生誕150年記念）の第一報

2009年12月20日(日) 午後
名古屋市国際センターで
講師は東海林敬子さん

Unicikle pilgrimi en Bjalistoko

IKAI Yosikazu (kongresa numero 1108 Japanio)

ATINGO

En la 23 vespere mi kune kun miaj du samvojaĝantoj s-roj Jamada (KN-1397 Japanio) kaj Maeda (KN-1482 same) atingis Varsovion. Fakte ĉifoja estas mia unua eksterjapana UK. La postan tagon ni jam estos en Bjalistoko, kie naskiĝis Zamenhof antaŭ unu kaj duono da jarcentoj.

HAZARDO

Mia unua anekdoto Esperanta en Pollando okazis jene. Mi rajdis mian uniciklon en centra parko de Varsovio, kaj altkreska eŭropa viro alproksimiĝis kaj scivoleme volis demandi pri la kurioza unurada biciklo. Tuj ekestis problemo lingva. Ni ne scipovas pole.



Li ne la japanan. Mi diris al li ke mi scias la anglan, la germanan, kompreneble ankaŭ la japanan. Nur pretere iu el ni triopo aldone menciis ke ni estas esperantistoj. Se mi estus sola, certe mi ne dirus tion ĉar mi ne dezirus veki senfruktan polemikon meze de parko. Sed tuj sekvis tute ne atendita evoluo: montriĝis ke li ankaŭ estas kongresano, kiu nomiĝas Nesmelov Sergej (KN-1686 Rusio)! Li tute hazarde vagis ĝuste en la sama parko. Leciono: portu verdan stelon aŭ esperantan flagon.

PONTO

Do uniciklo fariĝis ponto inter esperantistoj. Fakte mi enportis ne nur uniciklon sed ankaŭ ĵonglan sortimenton kaj eĉ akordionon. Mia intenco estis ne nur ĉiutage ekzerciĝi dumkongrese, sed ankaŭ amike kontakti kun nekonataj kongresanoj pere de tiuj prezentoj. Danke al tio mi povis konatiĝi kun multe da kongresanoj. Kelkaj petis prunte aŭ uniciklon aŭ akordionon. Aliaj dancis laŭ mia akordiono. Ankaŭ multaj aliaj, kiuj povas nek unicikli nek akordioni, aplaŭdis, humure spektis, fotis min. (Kongresanoj kiuj akordionas: Elio Nocent (KN-1762 Italio), Kees Ruig (KN- 1359 Nederlando) kiu loĝas apud akordiona muzeo, kaj aliaj. Kongresanoj kiuj ĵonglas aŭ/kaj uniciklas: Jonas Dalmose(Danio), Laszlo Tony (KN- 1399 Japanio), Monika Finnegan-Reuss (KN- 1138 Germanio), Poŝ Raj Subedi (KN- 566 Nepalo), Iwaya Micuru (KN- 824 Japanio). Mi menciis ĉi tie s-ron Albert Sĉubert (KN- 1541 Germanio), kiu estis profesia cirka uniciklisto. Fotintoj: Dan Krister Palm (KN- 319 Svedio), Wojcieĉ Bardzik (KN- 960 Pollando), Jamada Tadaŝi(supre), Toeko.

Ĝuste tian amikigan rezulton mi jam de longe ekspektis, ĉar tia estis mia origina intenco lerni tiujn artojn. Ne troige mi povas diri: mi alprenis ilin ĝuste pro Esperanto. Mi eĉ dubas ĉu mi estus lerninta tiujn se mi ne estus esperantisto.

REVIDIĜO

Kaj se temas pri amikiĝo, ne sufiĉas mencii nur novajn amikojn. Mi klarigu. Ek de 1990 ĝis 1994 mi apartenis al Esperanta fakultato de Budapesta Universitato (ELTE). Siatempe mi akiris amikojn pere de tiu studado. Sed post diplomiĝo mi perdis kontakton kun ili. Por mi des pli kortuŝa estis do subita revidiĝo kun plejparto de ili, post dek kvin jaroj, en Bjalistoko: Ilona Koutny (KN-138 Pollando), Jozef Doerr (KN- 251 Germanio), Bernhard Westerhoff (KN- 285 Germanio), Francois Simonnet (KN- 189 Francio), Imre Szabo (KN- Hungario), Arpad Mathe (KN-1664 Hungario), kaj aliaj. Ankaŭ ili siaflanke miris, ĉar mi, iam kabinetema, reaperis antaŭ ili kiel tute renaskiĝinta homo pro drasta maldikiĝo kvazaŭ atleto.

Inter tiuj, kiujn mi renkontis, estas ankaŭ tiuj kun kiuj mi konatiĝis en Japanio. Unu el ili estas germano Daniel Pfeiffer (KN- 1473 Germanio), kiu unuafoje provis mian unicklon en Jokohama UK 2007. Rekoninte min li diris ke li intertempe aĉetis kaj lernis rajdi. Do mi semis unickladon kaj jam reakiris rikolton! La aliaj: Istvan Ertl (KN- 1571 Luksemburgio), Mario Jose de Menezes (KN- 282 Brazilo) kaj aliaj.

Dum la semajno mi unickle ir-reiradis inter teatro, kongresejo kaj tranoktejo, kaj ne nur piedirantoj sed ankaŭ pasaĝeroj busaj ridetis aŭ miris aŭ bravois vidante min. Kvankam mi agnoskas la danĝeron de stereotipa ĝeneraligo, tamen mi diru laŭ mia impresoj ke la reago de varsovianoj kaj de bjalistokanoj al strataj prezentoj estas pli favora ol tiu de nagojanoj. Nagojanoj estas relative apatiaj al siaj najbaroj. (Nagojo estas meze inter Tokio kaj Kioto.)

SKANDALO

Nun mi rakontu ion neatenditan. Kiam mi foje vekiĝis en mia ĝemela ĉambro 405b de medicin-universitata studenta domo 2a, mi rimarkis paperfolieton metitan sur la apudlita unicklo. Sur la papero estis propono esperanta ke mi bonvolu vendi al la mesaĝinto la "duon-bicklon" malkare. Mi unue miris, ke iu pola frenezulo esperanta enkete eksciis mian kongresan numeron kaj sekve eĉ mian ĉambran numeron. Li ne haltis tie, sed eĉ verŝajne aŭdacis enŝteliĝi mian ĉambron dum mia dormo aŭ foresto, kaj lasis mesaĝon! Tio jam estas skandalo eĉ en Esperantio, kie ĉiuj estas ja "unu granda familio". Espereble li ne forprenis ion el mia valizo. Ekster Esperantio lia konduto estus belega atenco de privateco.

Tamen mi prikonsideris lian proponon aĉeti, kiom ajn freneza tio estas. Mi pripensis la polan situacion. Mi nur tiam ekkomprenis kiom malfacilas akiri unicklon en Pollando. Verŝajne ne estas produktejo de unicklo nek firmao kiu peras ilin. Do individuo devas pritrakti rekte kun alilanda firmao. Kredeble simila tipo unickla pezus al poloj kelkoble tiom kiom al japanoj.

Post du aŭ tri tagoj mi iris al la subĉiela koncerto, kiu okazos en la vasta urba parko. En la koncertejo jam kolektiĝis kelkcentoj da homoj kaj esperantistaj kaj neesperantistaj.

Antaŭ la komenco de la koncerto estis iom da tempo, do por ne enuigi la publikon mi faris prezentojn uzante unicklon kaj jonglajn ilojn, kun aplaŭdo.

FIASKO

Dum mi ankoraŭ atendis la komencon de la koncerto, pimpvestita maljunetulo (J.Duma (KN- 1508)) alparolis min. Li diris ke estas li kiu lasis la mesaĝon. Ĉu tiu aĝulo serioze volas ĝin por si MEM aŭ pli probable por sia nepo? Li respondis ke li mem volas, aldonante ke li ĉiutage biciklas dek kilometrojn kaj havas memfidon tiurilate. Kvankam lia letera kontakt-maniero estis iom ekstravaganca kaj maldeca, li estis sufiĉe serioza kaj konsiderinde normala. Ni disiĝis tiam por poste negoci.



Ĉu la leganto povas diveni ĉe kiu el ni nun restas mia unicklo finfine? Faktdire nek mi povas diveni! Ĉar ĝi estas nek ĉe li nek ĉe mi. Mi sentas baton en mia koro, ĉar mi devas klarigi fiaskon. En la lasta vespero de la kongreso mi senzorge lasis ĝin ĉe la balustrado de la kongreseja vestiblo ŝlosite per riglilo tra la tuta nokto. Kaj iu tranĉis la draton de la riglilo, kaj finite. La tutan posttagmezon de la posta tago mi perdis por enketiĝi de loka policano. La kongreseja tereno mem estas alirebla de ĉiufanko ne nur por esperantistoj sed ankaŭ por valoraj-esperantuloj sen kontrolo. Leciono A: Zorgu vian havaĵon. Leciono B: Vendu malkare ol perdi senpage.

Ĉar la urbo mem estas naskiĝurbo de Zamenhof, mi devas ĉi tie diri pri la turisma flanko de Bjalistoko. Certe ĉiuj bjalistokanoj konas pri li, ĉar li estas la plej famekonata bjalistokano tra ĝia historio. Verŝajne plejparto de la urbanoj konis, ke nun estas UK, kaj ni estis bonvenaj. Mi citu tipan anekdoton, kiu montras tion: foje kiam mi staradis en hazarde prenita buso, subite apudstaranta polo signis al mi ke mi elbusiĝu je la sekva haltejo. Sen kompreno, mi eliris laŭ la konsilo kaj nur tiam trovis ke ĝuste proksime estas placeto de Monumento al Zamenhof.

Mi multloke renkontis kongresanojn ne nur en la urbo, sed ankaŭ en turisma loko de Varsovio kaj en flughaveno ktp. Mi povis viziti Straton Zamenhof, kie estas la tereno de iama domo en kiu loĝis familio Zamenhof. Sed la plej domaĝe mi ne povis eniri la Zamenhof-Centron, kiun oni malfermis semajnon antaŭ la kongreso, ĉar estis post la ferma horo aŭ fermtago.

"PACA BATALANTO"

Mi aldonu kelkajn aliajn. Kiam mi, perdinte la amatan unicklon, sidiĝis ĉe fermo en la tenda halo Zamenhof, skipo de televida elsendejo proksimiĝis al mi kaj intervjuis min per interpreto. Tia afero neniam antaŭe okazis en mia vivo. Mi estis inter tiuj kelkaj, kiuj estis spektitaj ekrane en la samvespera novaĵ-programo de Televido Pola (TVP) (laŭ informo de Gunilla Almer (KN- 759 Svedio)). Iel tio estis konsolo por mia deprimiĝinta koro. Baldaŭ post la intervjuo mi lasis la ankoraŭ daŭrantan fermon, eliris kaj sidiĝis sur benkon. Kiam

mi umadis tie, denove alia skipo, ĉifoje de Gazeta, unu el la plej prestiĝaj ĵurnaloj pollingvaj, intervjuis min per interpreto. Tiu ĵurnalo raportis ĉiutage po tutan paĝon pri la kongreso. Inter kutimaj demandoj la intervjuinto demandis neatenditan demandon. Ĉu mi konas ke inter kongresano kaj lokano estis batalo? Mi ŝokiĝis. Kio estas tio? Esperanto estas lingvo de paco, sed ja tamen ĝuste en la mezo de Bjalistoko, la mekko de Esperanto, estis batalo inter kongresano kaj bjalistokano!? Fi!

Nur post pli ol unu monato nun, kiam mi estas verkanta tiun ĉi raporton, al mi venis en la kapon ke temas pri MI. Ke unu flanko de tiu batalduelo estas neniu alia ol MI MEM. Verŝajne la intervjuinto tute naive faris tiun demandon ĝuste al mi. Ankaŭ mi respondis tiam "Ne" same naive. Mi nun komprenas kiel sentis siatempe la mitologia Reĝo Edipo, kiu murdis/incestis siajn gepatrojn senscie. Nur nun la tuta sceno revenis en mian memoron. Mi ŝuldas al vi rakanti. Rakonti kaj konfesi mi ŝuldas antaŭ la bjalistoka gazetaro, antaŭ la bjalistoka polico, antaŭ la kongresanoj, kaj laste sed ne malplej grave, antaŭ la legantoj nun ĉi tie.

Du tri fojojn mi iris unicele al la urba centra placego de Bjalistoko por fari ĵonglan prezenton. Iun fojon, dum mi prezentis, alproksimiĝis al mi loka viro juna. Li volis provi sian batalkonon de karateo aŭ io simila kun mi. Kvankam mi tute ne estas luktanto, li ekbatalis kontraŭ mi. Mi unue pensis ke temas pri ŝerca prezento antaŭ publiko. Sed ne estis tiel. Li SERIOZE venis ataki min! Mi devis kontraŭataki, aŭ pli ĝuste diri, defendi. Sed mi baldaŭ estus faligita kun kontuzo aŭ sango surkorpe, se ĝustatempe ne estis aperinta polica aŭto por savi la scenon. Verŝajne tiu viro estas freneza luktmaniulo. Interese estis ke ĉiun ĉi evoluon fot-registris esperantisto, kiu hazarde estis tie. Li estis helpanto kiel ĉiĉerono de kongresa ekskurso. Mi ĉi tie esprimas koran dankon pro kunlabora prezento de farso. Danko estu: al tiu muskolforta frenezulo, al la ĝustatempa loka polico, kaj al la ĉionregistra fotisto-helpanto, kaj antaŭ ĉio la tuta publiko, kiu senfare kaj serene spektis la tutan scenon.

APENDICO

Se mi kolektus ĉiujn okazintaĵojn ĉi tie, la mondo mem ne estus sufiĉe vasta por teni ilin. Tamen mi citu nur kelkajn interesajn rimarkojn aliajn.

1 Pri akordiono.

Kiel mi jam skribis, multaj kongresanoj eŭropaj prunte petis kaj bele ludis ĝin. Malsame ol en Japanio, ĝi estas unu el la plej oftaj muzikiloj en Eŭropo.

2 Pri suvenir-monero

Dum la kongreso oni vendis pseŭdan moneron, kiu validas nur en Esperantio (seko@coinsclub.pl). Aĉetonto eĉ povas produkti mem marteles surloke. Verŝajne estas eĉ firmaoj kiuj pritraktas ilin. En la flughaveno, kiam mi atendadis la enkaĵutiĝon, mi konatiĝis kun viro pola (Tomasz Rylski). Li donacis al mi alian moneron oficiale validan kiel 2 zlotojn (www.nbp.pl)

3 Pri trajnhoro.

Post la kongreso mi kun multaj samideanoj envaĝoniĝis staplitaj en plenplenan trajnon al Varsovio. Tamen eĉ post la ekirtempo ĝi neniel ekiris. Baldaŭ montriĝis ke oni aldonos vagonojn verŝajne pro tro multe da homoj. (Pro tiu preparo la trajno ekiris duonhoron post



la plano). Danke al tia aranĝo mi estis unu el tiuj bonŝanculoj kiuj povis sidiĝi ĝis Varsovio. Nekredebla afero en Japanio.

4 Kelkaj aliaj ĉefaj kongresanoj nove aŭ denove renkontitaj:

Ursula Niesert (KN- 812 Germanio, tradukintino de Szathmari "Kazohinio" germane), Tomasz Ĉmielik (KN- 1028), Herman A. Haasjes (nederlanda blindulo), Kudo Madoka (KN- 652

Japanio), Hans (Nederlando, Esperanto-Domo), pola muzikisto kies adreso:ongakka84@yahoo.co.jp (tiel!), Jan Duda (KN- 1152 Ĉeĥio, violonisto), Delmiro Martins (KN- 1462 Portugalio), Paŭlo Cesar Pereira (KN- 521 Brazilo, Bona Volo), Bertrand Wick (KN- 306), Przemyslaw Wierzbowski (KN- 100 Pollando), Milleile Grosjean (KN- 227 Svisujo), kaj multaj aliaj famaj kaj ne tre famaj.

5 Du tri ne japanaj kongresanoj scipovis la japanan lingvon. Cetere, interese estas ke Edvige Tantin Ackermann (KN- 236 Italio) diris ke ŝia edzo estis premiita per ora medalo en boksado en Tokia Olimpiko 1964.

Kaiti skribas impresojn de:

Bjalistoko, urbo de UK

Frue pasas tagoj kaj nun ordinaraj tagoj rekomencas kiel kutime. Mi provas raporti iomete pri aferoj de la tagoj de la 94a UK.

S-ro Tonkin komencis sian paroladon pri la kongresa temo. Bjalistoko estas naskiĝ-urbo de Zamenhof, kie ni nun kunvenas, kaj Zamenhof estis pli ol kreanto de lingvo. Li kreis esperanta movadon kune kun tiu lingvo. Sinjoro Tonkin daŭrigis sian paroladon. La temo de kongreso "Zamenhof Hodiaŭ", "Krei pacan ponton inter la popoloj." Kiel ni konstruu ponton de paco super la torento de agreso kaj milito, kiu foje ŝajnas la sorto de nia misvojiranta homaro? kaj partoprenu kunsidojn sub la temo kaj diskutu!

Mi volas partopreni kaj diskuti, sed bedaŭrinde mankas al mi kapablo por diskuti en Esperanto. Alifranke, mi pensas ke paco estas grava kompreneble, sed por vastigi Esperanton esperantistoj bezonas krei novan kulturon inter ni.

Speciale junaj homoj havas novan senton ligi Esperanton kun nova kulturo. En interreto ni retumas diversajn informojn, kaj diversaj interesaj informoj allogas nin. Por junaj homoj uzi interese

kaj utile komputilon estas kompetentaj pli ol maljunaj homoj. Ekzemple, maniuloj pri moderna kaj pentra kaj rakonta kulturo en junularo, estas nomata "*otaku*" japane, Nuntempe ni multe vidas kaj aŭdas pri tiaj homoj. Ili naskiĝis kaj kreskas kaj kreskos.

Tiel same, se naskiĝo de nova kulturo en Esperantujo kreskus, Esperanto disvastiĝus, mi opinias.



Turku

Paŝi sur la stratoj per piediro estas sufiĉe afabla kaj interesa por mi. Mi amas promenadon. La urbo Turku estas trankvila kaj plena de multa historiaĵoj. La urbo rilatis al Hanso, aŭdinte tion mi komprenas riĉan historion de tiu ĉi urbo. Mi loĝis en hansa kvartalo, kaj aŭdinte tion, iomete mirinde mi revis pri la periodo de Hanso. La Biblioteko en Turku bone harmonias kun siaj malnovaj partoj, kaj la apartaj partoj havas sian etoson, kaj bone funkcias, laŭ mia sento. La biblioteko estis tre interesa por mi. Tie infanoj povas ludi kaj legi kaj komputi, kaj ankaŭ Esperantaj libroj estis legeblaj. Tie estis moderna kaj trankvila atmosfero. Gvidata vizito al la Katedralo de Turku donis al mi denovan senton ke kristana mondo ekzistas kaj ekzistos. Dum tiu ĉi vojaĝo, mi forte konscias tion.



Promenado laŭ rivero plaĉas al mi, la suno brilis kaj aero estis freŝa. Ne konata loko ŝanĝiĝas nun konata loko pro Esperanto.

S-rino Tina kaj S-ro Vekko, kiuj loĝas en Turku, ĉiĉeronis kaj klarigis nin. Ili bone zorgis pri ni, mi kaj mia amiko, kaj ni bone ĝuis ekskurson en Turku. Sed mankas al mi lingvo-kapablo por sufiĉe kompreni ilian klarigon, mi bedaŭris min iomete mizera. Ĉar mi ankoraŭ ne povas libere min esprimi en Esperanto.

Helsinki

Paŝi sur la stratoj per piediro estas sufiĉe afabla kaj interesa por mi. Mi amas ekskurson. Mi vere promenadis en la urbo Helsinki. Kiel bone estas en Helsinki! Konstruaĵoj de centra kvartalo en Helsinki bone harmonias kun siaj koloroj.

Post longa promenado, mi kaj mia amiko Tadaŝi volis iri al la hotelo Omenahotelli kie ni loĝis. Tiam ni trovis nin perditaj de vojo al la hotelo. Per turisma mapo, per klopoda demando kaj respondo, ni atingis la celon finfine.



En la 6a de aŭgusto ni partoprenis ceremonion de la urbo Hiroŝimo. Mi tute ne supozis, ke oni okazigas la ceremonion pri Hiroŝimo en ĉi tie Helsinki. Sed la ceremonio okazis apud lago en parko, paca vespero estis. Ĉiam kaj ĉie estu Paco, mi kore esperas. Bob Dylan kantas “Kiom da vojon ni devas iri antaŭ ol ni nomas iun la homo”. Malnova kaj malfacila problemo al ni ciuj.

En Helsinki, Finnlando, s-ro Keitu zorgis pri ni, li estis juna kaj bontakta esperantisto. Pro lia zorgo ni povis viziti la oficejon de Esperanto-klubo de Helsinki. S-ro iu (bedaŭrinde mi ne memoras lian nomon) atendis nin kaj li gvidis nin en la ĉambro. Sur la ĉambra muro estis surmetata pentraĵoj de portreto. Li klarigis la pentraĵon kaj indikis la vortaron de Esperanto-Finna, la plej malnova. Unua prezidanto kaj li kompilis la vortaron. La vortaro havas la daton 1917. Longan historion la asocio havas. Mi komprenas, kial ili metas portreton sur la muro.




Tiu ĉi vojaĝo mi bone sentas, ke Esperantujo ekzistas. Kaj necesas al mi klopodon por praktike uzi. (Kaiti MAEDA)

2011年10月には日本大会と韓国大会がプサンで共催

第96回日本エスぺラント大会は10月10～12日に甲府市の英和大学で行われました。参加者総数は379名。私は土曜日の初心者向きの会で歌を指導しそのグループが夜の Interkona Vespero で出演。日曜日午前はKristano の分科会に参加、山口真一さんは仏教分科会に。ザメンホフホールでの藤本達生さんの公演中には猪飼吉計さんも発言しました。

大会中、来年の第97回（長崎）の勧誘も行われました。その次の第98回日本大会は2011年プサンで第43回韓国エスぺラント大会と共催になり、韓国エスぺラント協会副会長のHo Song（許星）さんから歓迎の言葉がありました。また、第99回大会（2012年）は、北海道の札幌で開催することになりました。



編集後記・甲府から30kmのハケ岳エスぺラント館の日があり、大会前後にコンサートがありました。前期は11人、後期は16人の参加があり岩谷満夫妻のマンドリンとキーボードのデュエットがあり、半日遠足は谷川を歩いて清泉寮まで行きました。

JEIでは会員50年を記念して大会中に感謝状を出しています。都合でその場に出られなかったので配達で Honorigo という感謝状を受取りました。数年前には米川五郎さんが受取っています。（山田義）

